

P.Alberto Maggi OSM

TEMOSKEMO – Majo 1994

LA AGAPA AMO

KIAL MI TION FARAS?

La internaj kialoj kiuj puŝas onin agi favore al la aliuloj

LA ORDONO DE LA AMO

Unu el la plej gravaj malsamecoj inter la koncepto pri la ordono de la amo en la Malnova Testamento kaj tiu entenata en la kristana religio estas la universala amplekso de tiu ĉi lasta.

- En la judismo la amo estas selektiva, partianeca. Ĝi valoras nur por la “proksimulo” kaj ne por la aliaj homoj.
- Kontraŭe la kristana amo ne konas limojn, ĝi estas universala kaj ĝi ampleksas ĉiujn homojn. Ĝi estas amo al la malamikoj, kiu estas motivata de la rilato kun Dio, kiu levas Sian sunon sur la malbonulojn kaj bonulojn... “Tial amu viajn malamikojn,, kaj tiamaniere estu filoj de via Patro kiu estas en la ĉielo”(Mt.5,44)

Se ni serĉas la deirpunkton por kompreni la kristanan ideon pri la amo, ni devas ĝin serĉi en la agordo kun Dio; estas tio kiu donas al agapo ĝian karakterizon.

Fakte Jesuo ne venis alporti novajn ideojn aŭ konceptojn pri Dio, sed li venis alporti novan agordon kun Dio, kiu ne baziĝas sur la Leĝo sed sur la amo.

DIO AMAS LA PEKULON

KIAL?

Kiu serĉas kaŭzon por la dia amo, tiu ĝin neas. La agordo kun Dio ĉiam estus subigata al la Leĝo, kaj Dio amus tiun kiu pro sia sinteno meritis Lian amon pli ol aliulo.

DIO AMAS ĈAR LAŬNATURE LI ESTAS AMO.

La originaleco de la kristana agordo kun Dio konsistas en la fakto ke ĝi baziĝas absolute nur sur la agapo de Dio (la vorto agapo troviĝas nur du fojojn en la sinoptikaj evangelioj (Mt.24,12; Lk. 11.42) kaj ne en ĝia signifoplena senco. Ŝajnas ke estis Sankta Paŭlo kiu, la unuan fojon, enkondukis la vorton “ agapo” kiel fakan terminon por difini la kristanan motivadon pri la amo.

LA AGAPO ESTAS MEMVOLA KAJ “SEN KAŬZO”

Vane oni serĉas kaŭzon de la amo de Dio inter la karakterizaĵoj de la homo mem, kiu estas la celo de tiu ĉi amo.

La amo de Dio estas sen kaŭzo. La kialo de la amo de Dio kuŝas absolute nur en Dio mem. Ĝi estas amo absolute nur spontana, kiu ne serĉas la kialon en la homo, dirante ke Dio amas la homon oni ne intencas esprimi juĝon pri la eco de la homo, sed oni celas difini kia estas Dio.

Se la amo de Dio vere valorus nur por la justulo, tiam ĝi estus akirita kaj ne spontana amo. Sed ĉar ĝi serĉas la pekulon kiu ĝin ne meritas, kaj kiu ĝin ne povas postuli, tiamaniere evidentiĝas ĝia spontana kaj senkiala karakterizo.

LA AGAPO ESTAS INDIFERENTA AL LA VALOROJ

Se Dio amas la pekulon tio ne okazas pro la peko sed malgraŭ la peko. La amo de Dio ne sin lasas limigi de la homa sinteno.

La amo de Dio al la justuloj estas same spontana kaj sen kialo ol tiu al la pekuloj.

LA AGAPO ESTAS KREA

Ni vere komprenos la decidan signifon de la koncepto de agapo nur kiam ni komprenos ke temas pri dia amo, kaj ke pro tio ĝi partoprenas en la kvalito kiu estas komuna al la tuta dia vivo, nome en ĝia krea karakterizo.

La agapo estas krea amo: la dia amo ne amas tion, kio estas aminda en si mem, tute male: KIO EN SI MEM ESTAS SENVALORA AKIRAS VALORON FARIĜINTE OBJEKTO DE LA DIA AMO

La agapo ne konstatas valorojn, ilin ĝi kreas

La agapo donas valoron amante.

LA AGAPO KREAS LA AGORDON

Ĉar la agapo kaj ties karakterizaĵoj estas la kerno de la kristana agordo kun Dio, pro ĝia krea karaktero ĝi gravas eĉ rilate la realigon de tiu agordo mem.

LA ATESTO DE LA PARABOLOJ

Pluraj paraboloj de Jesuo estas tute ne kompreneblaj se oni ne ilin metas en la fonon de la ideo pri agapo (vidu La erarinta filo, La vitkulturistoj, La perdita ŝafo...).

La agapo kiun oni petas al la kristano estas la bildo de la agapo esprimita de Dio. Kiel tia ĝi devas esti spontana kaj sen kialoj, manka je kalkuloj, senlima kaj senkondiĉa.

LA ORDONO DE LA AMO

AMO AL DIO:

“Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj per via tuta forto. (...Mk.12,30) Amu vian proksimulon kiel vin mem.

Ĉi tie temas pri senkondiĉa kaj absoluta aparteno al Dio.

****Eviti la riskon ami Dion en la proksimulo: Oni devas ami la proksimulon en lia konkreta kondiĉo kaj en lia konkreta estaĵo kaj ne en iu konstruita idealaĵo, ne “Dio en la proksimulo”. Se la amo ne sin turnas al proksimulo, sed al lia supozita dia esenco tiam ĝi ege malproksimas de la senkaŭzeco kaj anstataŭe ĝi estas ege motivita... kiam ĝi ne estas hipokriteco!**

La dia agapo estas amo kiu alfrontas ĉiun racian klarigon. Ekzistas neniu kialo por serĉi malantaŭ la realaj kvalitoj de la proksimulo iun ajn kaŝitan aŭ altvaloran kvaliton kiu ekspliku kaj pravigu la amo al li.

Se mi amas Dion en la homo, tiam mi amas mian proksimulon nur konforme al lia partopreno en la dieco. La proksimulo estas nur la meza objekto de la amo, kies fina objekto estas Dio. Sed tiam ne plu estas tiu ĉi homo kiun mi amas sed, pli ĝuste lian dian ideon, Dion en li. La amo estas konsiderata kvazaŭ “merito”, antaŭenpaŝo sur la ascenda vojo kiu kondukas al Dio.

Ĝi estas etapo en la persona supreniro de la homo.

DONI LA EKZEMPLON

Ami la proksimulon “por esti kiel ekzemplo/ por doni ekzemplon”

Kiu pretendas teniĝi laŭ certa maniero por esti kiel ekzemplo aŭ doni ekzemplon, tiu supozas sian superecon rilate la aliulo, kiu ricevas tiun ekzemplon...

Oni ne amas por doni la ekzemplon, por “helpi” la aliulon, sed por sin meti je sia servo.

En la Evangelioj neniam ni trovos la inviton de Jesuo esti kiel ekzemplo aŭ doni la ekzemplon! La ununuran fojon kiam la termino aperas [greke hypodeigma] estas ĉar la modelo kiun oni devas preni kiel ekzemplon estas Jesuo mem: mi donis al vi ekzemplon, por ke vi ankaŭ faru tion, kion mi faris...” (Joh.13, 15).

Ne nur Jesuo ne invitas doni ekzemplon, sed Li riproĉas tiun kiu estu tentata tion fari: “Gardu vin, ke vi ne faru vian justaĵon antaŭ homoj, por esti alrigardataj de ili; alie vi ne havas rekompencan ĉe via Patro, kiu estas en la ĉielo”.(Mt.6, 1)

La amo al la malamikoj:

kiam Jesuo petas ami la malamikojn ne temas pri hiperbola formo de la ordono de la amo. Se la amo al la proksimulo devas vere havi la karakterizajn trajtojn de la agapo, tiam, antaŭ ĉio, necesas ke ĝi estu spontana kaj sen kialo. Sed kiam ajn ĝi povus esti tia se ne kiam ĝi sin turnas ĝuste al la malamiko?

Nur ĉi tie klare aperas ke ne temas nur pri homa amo sed pri amo naskiĝinta de la agapo de Dio. Per la amo al la malamikoj la kristana amo sin malkaŝas kiel la vera, spontana kaj krea agapo; fakte ĝi kreas agordon ankaŭ kie ĝi ŝajnas ekskludita.

Tiamaniere oni vidas ke la agapo estas amo ne nur homa, sed ke ĝi estas elverŝo de la vivo mem de Dio, de tiu amo de Dio kiu estas verŝita en niajn korojn per la Sankta Spirito, donita al ni. (Rom. 5,5). Dio kaj la agapo estas tiom strikte kunligitaj ke oni fakte povas paroli pri identigo. En la 1Joh. estas malkaŝe proklamita du fojojn la identeco inter Dio kaj la agapo (1Joh.4,8.16), oni renkontas la

dirmanieron “Dio estas agapo (amo)”;

la koncepto de agapo (amo) trovas ĉi tie sian plej altan esprimmanieron. Dio estas agapo (amo) kaj la agapo (amo) estas Dio, Dio kaj la agapo (amo) estas unu sola afero: la agapo (amo) kiel tia estas partopreno en la vivo de Dio, sendepende de la objekto al kiu ĝi rilatas.

LA KONTRASTO

La agapo (amo) venis trafi rekte kaj la judan religiecon kiu estas karakterizita de la Leĝo, kaj la helenisman piecon pri eroto.

“Dio ne havas rilatojn kun iu ajn homo” diris Platono, kaj por la Heleno, kompreneble, la dioj ne amas.

La kristanismo kontraŭas tiujn konceptojn: Dio estas amo, amo kiu estas deziro de agordo kun la homo.

Laŭ Aristotelo la diaĵo preferas la saĝulon. Dio kontraŭe elektas la malsaĝajn objektojn, la malfortajn objektojn (1 Kor. 1, 27). Kiel skribas Nietzsche vere okazis “renverso de ĉiuj malnovaj valoroj”.

El etika vidpunkto, la agapo (amo) devis ŝajni maljustaĵo: ĝi kontraŭas la idealon de la saĝulo per la ideo de la altigo. Ĝi diametre kontraŭas la koncepton pri Eroto, la supreniron de la homo ĝis la dia sfero.

El religia vidpunkto tio estas blafemo: ĝi kontraŭas ĉion kiu karakterizas la malnovan koncepton pri Dio.

La homo ne amas Dion ĉar li volas kontentigi sian bezonon mem je la dia pleno...

Oni ne amas Dion ĉar Lin komparante kun la ceteraj realaĵoj la homo estis trovinta en Dio pli grandan kontentigon, sed ĉar la dia agapo (amo) sen kialo lin venkis kaj konkeris tiel ke li ne povas Lin ne ami:” Jen estas la amo, ne ke ni amis Dion. Ni amas, ĉar Li unue nin amis...” (1 Joh. 4,10.19).

Same okazas por la amo al la proksimulo.

En la objekto de la amo kuŝas neniu kialo por pravigi la amon: la kialo estas Dio mem. Dio ne kiel lasta celo de la amo al proksimulo, sed kiel elirpunkto kaj konstanta kialo por ekzisti.

Ĉar Dio estas agapo (amo) kiu ajn estis amata de Li, konkerita kaj interesita de Lia amo, tiu ĉi devas transdoni tiun amon al sia proksimulo. Tiamaniere la amo al Dio senpere transformiĝas en kristana amo al la proksimulo. Estas la agapo (amo) mem de Dio kiu uzas la kristanon kiel sian ilon por enpenetri la mondon.

